



MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO 12

DECEMBRO 2024 Kol. 473/40

Enhavo: KAEST, Konferenco Unesko, Kristnaska ŝtolo,
El la redakcio, Trista anonco

KAEST 2024 pri AI

Post du jaroj KAEST – Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko – okazis denove. Ĝi okazis en Žilina inter la tagoj de la 7-a ĝis la 10-a de novembro 2024. Gastigis ĝin la hotelo Galileo. La ĉi-jara ĉeftemo estis “Esperanto kaj lingvolernado en la epoko de artefarita intelekto kaj virtuala realo”.



Vendredon antaŭtagmeze salutis la konferencon ne nur la vicprezidanto de UEA, Fernando Jorge Pedrosa Maia Jr., sed ankaŭ la Artefarita Inteligenta AI mem – en Esperanto eĉ pli perfekta, ol tiu de (multaj) multjaraj esperantistoj.

Sepdeko da diverslandaj partoprenintoj sekvis kvaroncenton da prelegoj.

La komenca prelego de Peter Baláž „Robotoj alvenas – aŭtomatigo, artefarita intelekto kaj la minaco de la senlabora estonto“ estis inspirita de la libro de Martin Ford (Rule of the robots – Rego de la robotoj) kaj de la lastatempa rapidega evoluo en robotiko kaj AI. La prelego starigis multajn interesajn demandojn, sed, bedaŭrinde, ne estis tempo por diskutante serĉi respondojn al ili.



Karlo Spinola per sia prelego „Ekde Sumero ĝis James Webb, serĉantaj nian lokon en la kosmo“ vojaĝigis nin tra la tempo kaj paŭzigis nin ĉe la momentoj kaj homoj, kiuj konstruis novajn modelojn de la Tero kaj

de la Kosmo, kaj pelis nin al la steloj, kvankam kontraŭe al la tiutempaj momentaj spertoj.

La sekretariino de la Interkultura Novelo-Konkurso INK, Stela Besenyei-Merger, parolis, kiel la konkursantoj traktis la temon de la 4-a eldono „Artefaritaj intelektoj, pensantaj maŝinoj kaj Homo sapiens“. Ŝi eĉ taskis al ni verki kelkajn liniojn laŭteme, kaj tiel malkovri propran rilaton al AI. Rigardu mem la paĝaron de la konkurso (<https://bobelarto.ink/>), ĉar ĝia kvina eldono atendas viajn novelojn kun la temo „La detalo, kiu ŝanĝas ĉion“. Sabaton per unu horo kaj 30 minutoj longa prelego pri sia kreado de vortaroj ravis nin Mirek Malovec. Tiun ĉi tre laboreman, sed ege modestan esperantiston, kiu ankaŭ ciferecigas esperantlingvan literaturon kaj tradukas, oni devas vere admiri.



Lian prelegon kompletigis dimanĉa prelego de Ilona Koutny el la Universitato Adam Mickiewicz en Poznań, kiu jam verkis kelkajn trilingvajn laŭtemajn vortarojn, kie Esperanto funkciis

kiel la akso inter etnaj lingvoj. Ŝiajn paperajn vortarojn enretigas Milan Kolka, programisto el Brno, ene de SET – Strukturita Esperanta Temvortaro.

Tre interesa estis ankaŭ la prelego de Michael Vrazituli, doktoriĝanto pri psikolingvistiko ĉe la Universitato de Potsdam. La studo de frazkompreneado, kiel subbranĉo de psikolingvistiko, celas malkovri kaj priskribi la mensajn procezojn, kiuj ebligas al homo konstrui la signifon de frazo



dum ĝia legado aŭ aŭskultado vorton post vorto. La empiriaj rezultoj el grandskalaj eksperimentoj servos kiel komparmezurilo por konkurantaj matematikaj modeloj de

mensaj procezoj.

Ni ne forgesu ankaŭ tre interesan paroladon de Petro Chrdle, kiu per konkretaj ekzemploj laŭ siaj propraj spertoj menciis diversajn manierojn de informado pri Esperanto kun analizo de ilia efiko. Li substrekis, ke strebante trude konvinki iun, ke Esperanto estas utilega, oni povas el la aŭskultanto produkti ĝian malamikon.

Pri la aliaj prelegoj vi povas mem legi pli sur la KAEST-paĝaro <https://kaest.ikso.net/2024>.

Interesa estis ankaŭ la ateliero gvidata de la skipo de VR Mondo en la Esperanto-Stacio Berlin. La scivolemuloj povis mem elprovi Miksitajn Realecon (MR) ludante per specialaj okulvitroj kaj programo Meta Quest 2.

Ankaŭ la vesperoj ne estis senprogramaj. Ĵaŭdon la dekjaran jubileon festis kune kun Eva Fitzelová kaj Johannes Mueller ĉiuj partoprenantoj, ne nur aŭskultante ilian paroladon pri la podkasto kern.punkto (<https://kern.punkto.info/>), sed ankaŭ



tostante.
Vendreda
vespera
vingustumado
plifaciligis
interkonatigadon kaj
uzadon de
parolata
Esperanto.
Krome
multaj
partoprenantoj
riĉigis la

tablon per bongustaĵoj alportitaj el iliaj devenlandoj. Ankaŭ dum la sabata komuna vespero mankis al vigla kunbabilado nek trinkaĵoj, nek manĝetaĵoj.

Post kiam Magdaléna Feifířová el la loka E-klubo ĵaŭdon konatigis la partoprenantojn kun la gastiga urbo perbilde, sabaton posttagmeze oni povis konatiĝi kun ĝi proprapiede, sub la gvido de urba ĉiĉerono (kies paroladon tradukadis Pavol Petrik). Tiuj, kiuj ne urĝiĝis hejmen, povis dimanĉon posttagmeze viziti la kastelon Budatín kaj ties dratumistan ekspozicion.

La reĝo mortis, vivu la reĝo! Post du jaroj ni renkontiĝu dum sekva KAEST...

Fejfi, 2024 11. 11.

KONFERENCO UNESKO KAJ ESPERANTO

La 10-a de decembro 2024 estos grava tago por Esperanto, ĉar ĝi markos la 70-an datrevenon de la Rezolucio de Montevideo, la unua kaj plej signifa oficiala agnosko de Esperanto fare de Unesko. La Rezolucio, akceptita de la Ĝenerala Konferenco de Unesko en la urugvaja ĉefurbo en 1954, rekomendis al la Ĝenerala Direktoro de Unesko sekvi la evoluon de la uzado de Esperanto kaj agnoskis, ke la atingoj de la Esperanto-movado “respondas al la celoj kaj idealoj de Unesko”.

Por festi la 70-jariĝon kelkaj agoj estis planataj. Ĉefe okazos la Konferenco “Unesko kaj Esperanto: 70 jaroj da kunlaboro por lingvaj homaj rajtoj” la 10-an de decembro 2024 en la impona Parlamenta Palaco de Montevideo, kie okazis ankaŭ la historia Ĝenerala Konferenco de 1954. La konferenco okazis danke al la klopodoj de Urugvaja Esperanto-Societo (UES), landa asocio de Universala Esperanto-Asocio (UEA), kun subteno de UEA,

TEJO, ILEI, Eurokka kaj landaj organizoj en Ameriko. Tiu festkonferenco inkluzivos paroladojn, surlokajn kaj retajn prelegojn, elmontrandon de dokumentaj filmoj kaj artajn prezentaĵojn. Aldone aperos artikoloj en la revuo *Esperanto* kaj estos programeroj pri la rezolucio kaj ties historia fono dum la 5-a Virtuala Kongreso de Esperanto (VK).

Historio: La Rezolucio estis rezulto de longa kaj persista laborado de UEA kaj aliaj Esperanto-organizaĵoj, kiuj kolektis kaj transdonis al UN petskribon favore al Esperanto, subskribitan de preskaŭ 900 mil personoj kaj reprezentantoj de preskaŭ 500 organizaĵoj kun entute pli ol 15 milionoj da membroj. Tiu peticio, sendita al UN en 1950, postulis, ke UN studu la lingvan problemon en la mondo kaj la eblan rolon de Esperanto por ĝia justa solvo. Ĝi tamen ne estis traktita de UN, sed transdonita al Unesko.

Nia observanto ĉe la Ĝenerala Konferenco de 1954, Ivo Lapenna, tiama estrarano de UEA, ne havis grandajn esperojn pri la sukceso de la afero. Tamen la situacio surprize ŝanĝiĝis, kiam la meksika delegitaro, impresita de la ekspozicio pri Esperanto, kiu estis aranĝita kaj de lokaj esperantistoj kaj de UEA, proponis projekton de rezolucio, kiu rekomendis al la membro-ŝtatoj kuraĝigi la uzon de Esperanto. Post multaj diskutoj kaj kompromisoj la Rezolucio estis akceptita de la pleno de la Ĝenerala Konferenco la 10-an de decembro 1954, vendrede posttagmeze, sed kun malpli radikala teksto, sen la rekomendo al membro-ŝtatoj. La Rezolucio tamen estis granda venko por nia movado, ĉar post ĝi UEA akiris oficialan kaj konsultan statuson ĉe Unesko.

El la Gazetaraj Komunikoj de UEA

Kristnaska ŝtolo (ĉeĥe *Vánoční štola*)



Eble en multaj landoj (en Germanio certe) tiu ĉi kristnaska bakaĵo estas konata. Tamen mi povas doni al vi recepton por tiu ĉi bongusta, dolĉa adventa aŭ kristnaska bakaĵo. La preparo estas facila, rapida, sen pasto-

ŝvelado... Mi bakas ĝin kun miaj gefiloj.

Pasto-ingrediencoj: fajna faruno (500 g), mola kazeo (250 g), kristala sukero (120 g), butero (150 g), 2 ovoj, vanilita sukero (1 saketo, 20 g), bakpulvoro (1,5 saketo, 20 g), ĉokolado (laŭ via gusto), rosinoj, nuksoj, kandita (sekigita) frukto. Por ŝmiri la bakitan ŝtolon: butero (50 g), pulvorsukero, kakao.

Preparo de la pasto: ĉiujn ingrediencojn krom (sekigitaj) ĉokolado, nuksoj, rosinoj kaj kandita frukto ni metas en pastujon kaj prilaboras en paston. Poste ni aldonas la restajn ingrediencojn (rosinoj, tranĉpecigitaj nuksoj, fruktoj, ĉokolado). Sur la pastotabulo ni rulpremas la paston en plataĵon 2 – 3 cm dikan (eble pli) kaj longan ne pli ol via bakplato. La plataĵon ni trifoje faldas kaj metas sur la bakplaton kun bakpapero (aŭ al oleo-ŝmirita kaj farunkovrita bakplato). Ni bakas en bakforno antaŭvarmigita al 175 °C ĉirkaŭ 40 – 45 minutojn.

Post la eltiro ankoraŭ varman ŝtolon ŝmiru per fandita butero kaj verŝu (helpe de filtro) pulvorsukeron miksitan kun kakao. Ne timu kaj ŝmiru funde kaj sukerumu la ŝtolon multfoje – estiĝos krusto sur ĝi, la ŝtolo estos pli bongusta kaj longe mola. Mi pakumas ĝin (malvarmiĝintan) en folion kaj kelkajn tagojn lasas „ripozi“ en malvarma loko. Bonan apetiton!

Jar. Matuška

El la redakcio : Estimataj legantoj, en la artikolo "Formikoj kiel savo" estas eraro pri la kvanto de formikoj, kiel atentigis nin nia amiko Rob. En la artikolo unue estis la vorto "biliardoj", kiun unu el niaj korektantoj korektis por ni al "bilionoj?" - kaj ni ne tro pripensis pri la kalkulo dum nia korekto Pardonon petas Mirka kaj Ludmila.

Trista anonco:

La 1-an de novembro mortis Božena Lorencová, 91-jara, multjara anino de AEH. Forlasis nin bona amikino, kiu bele kantis kaj ĉiam aprezis bonan ŝercon.

Honoron al ŝia memoro.



INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice

Redaktoroj: Mirka Kosnarová, Ludmila Srbová

Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. +420 721 537 970

e-mail: aeh@esperanto-aeh.eu interreto: www.esperanto-aeh.eu

Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010

Bankovní spojení: Fio banka, číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**

IBAN: CZ3520100000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX

La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ **10 €** (e-mail)

Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)

Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.

Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z

La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.